



NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.



Impresoj pri Rusio

Tuj post la sukceso de la rusa vespero organizita de nia klubo, januare 2010, naskiĝis en mia kapo nova projekto. Mi sciis, ke la vojaĝintoj de la antaŭa japana periplo verŝajne estus pretaj sekvi min okaze de novaj malkovroj en la esperanta mondo. Kial ne en Rusio ?

Post kelkaj antaŭaj kontaktoj kun rusaj geamikoj por kontroli la fareblecon de mia plano, alvenis la momento informi miajn samklubanojn koncerne tiun novan proponon. Kvazaŭ sen pripenso entuziasme kunveniĝis ok personoj!

Por prepari itineron, programon kaj restadon en diversaj urboj, mi apogis min sur la kapableco de fame konataj spertuloj, **Mikaelo Bronŝtejn** el Tiĥvin,

En tiu numero :

Impresoj pri Rusio :	1 - 3
Reta eldono : Le Monde Diplomatique	3
Novelo en urba biblioteko :	3
Peresperanta vivsano :	4
Trevor Steele :	5
Esperantistoj en Gronlando :	6
Kotizoj Abonoj 2012	6

Post komforta nokto en trajno, ni alvenis Ivanovon, unua etapo sur rondiro de « Ora Ringo ». Svetlana, vigle kaj efike kuntiris la grupon al malkovro de senpreza historia heredaĵo: la « Dormada Katedralo », la « Ora Pordo », la belega muzeo pri lakaĵo, brodaĵo, vitroarto.

Klasita historia monumento, la urbeto Suzdalo ankaŭ nomata « Perlo de Ora Ringo » ofertis multegon da bulboj, sonorilojn, multkolorajn lignodomojn, aŭtentikan bazaron en libera aero... Tiu ege bela loko nin instigis al gapvagada tempo.

Finiĝis la vojaĝo en Moskvo. Por mi Moskvo estas miksaĵo de sufokiĝo, de ia sveno, eĉ konfuzego sed ankaŭ kompreneble, granda miro kaj admiro fronte de tiom da arkitektura riĉeco, tiom da interesaj artaj muzeoj perfekte valorigitaj, facile vizitotaj dank'al metroo. Tiu mirinda metroo, krom ĝiaj allogaj ornamitaj stacioj sin prezentas kiel la plej oportuna moskva veturilo.

Sed pri kia sufokiĝo mi aludis? Malfacile estas tion klarigi! Eble, post longa vojaĝo de preskaŭ tri semajnoj, laceco emocie impresis min? Mi ne plu toleris tiun « kirloventon » da preĝejoj, bulboj, oroj, ikonoj ktp. Tiuj kultaj lokoj certe ja meritas turisman invadon sed ĝenas min gemizeruloj, frenezaj je devoteco, kies malriĉa vestoarango netolereble kontrastas kun la lokaj riĉabundoj.

Ankaŭ restas enskribita en mia memoro la jena netolerebla teruraĵo: tuj post nia alveno en Moskvo, konsterne ni vidis amputitan junulon, uniforme vestita, sidante sur kriplaseĝo kiu almozpetis... Iu viktimo de la ĉeĉena milito?

Finfine tio estis bela vojaĝo, stampita per amikeca sigelo. Dank'al Esperanto kaj niaj sindonemaj organizantoj restos por mi nombraj momentoj de reciproka ĝojo, ĉefe en Tiĥvin kun Vera, Vasili, Mikaelo kaj la aliaj kaj ankaŭ neanstataŭigebla persona riĉigo, kultura kaj emociplena.

Michelle PAUMIER

... Miaj plej gravaj impresoj estas la vastego de tiu lando, la grandaj distancoj inter la urboj, la multaj arbaroj kaj la nekredebla alteco de la monumentoj memorigante la duan mondmiliton.

El Tiĥvin precipe, mi havas eternan kaj kortuŝan memoron: koncerton de rusaj romancoj. Ĉiu voĉo, ĉu virina, ĉu vira, subjugis la aŭskultantaron ...

Brigitte COTTIN

Poŝtmarko :

1973 :

**Tria Internacia Vintra
Renkontiĝo de
Esperantistoj
en Hungario.**



NOVELO en

URBA BIBLIOTeko

Ĉu la afero fariĝos tradicio ? Tro frue por tio, sed por la dua fojo Herouville Esperanto estis invitita, la 10an de novembro legi ion en esperanto kadre de mateno pri lingvoj en la urba biblioteko de Caen. Verkoj diverslingvaj (norvega, angla, sveda, turka, hispana, malezia, ĉina, japana, rusa, armenia kaj aliaj) estis legitaj, kelkfoje kantitaj, antaŭ malgranda sed interesata publiko. Ni elektis tre amuzan novelon de itala esperantistino, Clelia Conterno Guglielminetti, « Vivo kaj morto de Wiederboren » (1961). Legis ĝin esperante kaj france Jean-Christophe Groult, Michèle Paumier, Jean-Pierre Sauvage, Yves Nicolas. Ni disdonis la novelon en la franca kaj en esperanto, por ke la publiko sekvu mem la tekston dum la laŭta legado.

Yves NICOLAS

Reta eldono de Le Monde diplomatique en esperanto - Novembro 2011

« En la Tuniso de 1956, jam konstituciiga asembleo. La turka registaro fronte al la kurda defio. Hispanio, en tuja danĝero. Ĉinujo malsana pro sia karbo. « Verda murego » por Afriko. Kalikato aspiras brili pli hele » :

La ses lastaj artikoloj publikigitaj en **Le Monde diplomatique en esperanto** temas pri ses apartaj regionoj de la mondo. Redaktitaj de altnivelaj ĵurnalistoj, ili ne supraĵe sed funde traktas ĉiujn temojn, pri kiuj ili fakas. Laŭ kontrakto kun la franca revuo **Le monde diplomatique** la esperanta reta eldono estas senpage alirebla de ĉiuj, tiel proponante al esperantistoj de la tuta mondo tre altnivelajn ekonomi-politikajn kaj priekologiajn legaĵojn. Legantoj povas esprimi sian opinion pere de la forumoj, sube de ĉiu artikolo.

<<http://eo.mondediplo.com/>>

Laŭ informo de : **J.-M. CASH**

PERESPERANTA VIVSAVO

En januaro 1959 mi lanĉis la unuan publikan senpagan kurson de esperanto en Tananarive, ĉefurbo de Madagaskaro. La sukceso estis grandega : eble 250 personoj venis al la unua kurso. Tri kvaronoj da ili estis junaj malagasaj studentoj de la etnio « merina » de la centraj altaj ebenaĵoj de la insulo, palhaŭtaj, mezstaturaj, bone vestitaj kaj ŝuizitaj, videble apartenantaj al la monizita loka burĝaro. La kvara kvarono konsistis el lokaj francoj inter kiuj estis bona proporcio da adeptoj de la religio Baha'i, feliĉaj fine kontentigi postulon de sia religio, kiu estas lerni esperanton.

Skribante la nunan artikolon, mi ne celas paroli pri la aventuro de tiu kurso kaj ĝia sekvo, sed pri aparta veninto. Fakte, inter la malagasoj, unu havis nigran haŭton, staturis ĉirkaŭ 1,85 m, estis fortekega sed estis malriĉe vestita kaj nudpieda. Videble li apartenis al marborda etnio. Ankaŭ li bone parolis la francan, sed estis haltinta studojn je elementa nivelo. Liaj karakterizaĵoj estis ĝoja vizaĝo ĉiam ridanta, babilemo, granda deziro kion ajn lerni, kaj fiereco frekventi dank'al esperanto malagasojn de klaso supera je la sia, kaj francojn. Li eble tial fariĝis tre fidela lernanto dum la kvin jaroj de mia restado en Madagaskaro, kaj iom post iom ni amikiĝis. Mi nomos lin « Eoro ».

Eoro estis malriĉa kultivisto kiu vivis el parteto de la rizejoj situantaj kvar kilometrojn for de la urbocentro, apud la « Route des hydrocarbures », vojo kiu kondukis al la vilaĝgrupo de Alarobia kie mi loĝis kun mia edzino. Li ofte venis nin viziti hejmen, kaj per li ni interŝanĝe povis viziti indiĝenajn vilaĝojn, promeni piroge en rizejoj, eniri la humilan kabanon en kiu li vivis kun sia familio kaj multnombra gefrataro.

Iutage, nia amiko Eoro alvenis niadomen kun nekutima griza kaj funebra vizaĝo.

- Bonan tagon Eoro ! Kio okazas ? Vi ne aspektas kiel kutime.

Silento. Mi insistas.

- Kio fuŝas, ĉu vi malsanas ?

-... Mi estas mortonta ...

- Kio ? ! ! Kio vin pensigas tion ? Oni ne mortas je via aĝo, fortika kiel vi estas !

Post kelkaj hezitaj kaj obstinaj ripetadoj de sia kondamno, Eoro fine triste flustris :

- Mi estas ensorĉita ; iu volas mian morton, vidis la sorĉiston por ke li ĵetu al mi fisorĉaĵon. Mi ne atentis, kaj elirante el mia domo, mi verŝajne transpaŝis super « ody » (prononcu « ud » = sorĉaĵo) surtere metita antaŭ la pordo, kaj mi estis kaptita.

- Sed, ne estas serioza ! Sufiĉas ne kredi je tio, kaj ne efikas ! Nur via kredo kaj timo povas eventuale vin kaŭzi damaĝon.

Sed tiuj okcidentaj argumentoj ne konvinkis Eoron kiu persistis je sia certeco pri baldaŭa morto. Li kontraŭargumentis ke ni « vazah-oj » (fremduloj) estis imunaj koncerne tiaj malbonintencaj fifaroj, sed li, ne ; li estis perdita. Mi insistis por ekscii kiel konkrete manifestiĝis lia malbona stato, kiuj estis liaj simptomoj. Li hezitis kaj oblikve rigardis al mia edzino kiu antaŭsentis ke eble temis pri vira afero, kaj eliris. Tiam li finfine mal-laŭte eldiris, laŭvorte, kun tono signifanta « vi ja vidas ke estas senapelacia » :

- Mi havas kreskantan bulon ĉe pugo !

- Verŝajne vi havas hemoroidon ; nenio alia ?

- Ne. Hemoroido, kio estas ?

Mi klarigis, etendis la brakon por preni la medicinan vortaron kiu staris sur breto je unu metro de mia brakseĝo, serĉis la konvenan paĝon, legis al li la artikolon pri hemoroidoj, montris la krokizon, substrekis la banalecon de la afero kaj la tre favoran prognozon.

Tre rapide la vizaĝo de Eoro relumis kaj refariĝis tiun de la kutima ŝercemulo ; li estis savita : la Scienco konis lian malsanon, kiu estis priskribita, presita, banaligita inter multaj aliaj malsanoj, en ordinara libro sur ordinara breto, en ordinara domo de ordinara homo inter multaj same humilaj aliaj libroj

La sorĉaĵo kaj la scienco de la sorĉisto ĉirkaŭita de fatraso de fantazie elpensitaj terurigiloj, falis el sia piedestalo.

Mi konsilis al mia lernanto ne manĝi pimenton dum kelkaj tagoj, ĉar en Madagaskaro oni manĝas abomene pimentite ; eble li sekvis la konsilon, kaj tre rapide la bulo malaperis. Li refariĝis la kutima ĝoja kamarado. Kio estus okazinta se li ne estus havinta konsultulon por forĉasi lian superstiĉon ? Li estus longe kuntreninta neestadon, aŭ estus devinta kare pagi sorĉiston, eble la saman, kiu estis lin « ensorĉinta », por li pretigi kontraŭsorĉaĵon !

Henri ROUSSEAU



Conférence par Trevor Steele

LES ABORIGÈNES**Mercredi 19 octobre 2011 à 18h30**Salon de thé / Librairie **POUCHKINE**10 place de l'Horloge à **Hérouville Saint-Clair**

Conférence
en Espéranto
par Trevor Steele,
auteur australien à
partir de son roman
«*Flugi kun kakatuoj*»

Traduction
assurée par
"Espéranto-
Hérouville"

Réservation: nicosibi@club-internet.fr
ENTRÉE LIBRE



Trevor Steele haltis en Hérouville la 18an kaj 19an de oktobro, kadre de prelegvojaĝo en Francio. Li estas konata kiel esperantista verkisto sed havis multajn spertojn en esperantujo kiel instruisto, direktoro de la sidejo de UEA, ktp.


Kvardek personoj, deko neesperantista, ĉeestis lian prelegon pri aborigenoj. Dum unu jaro li instruis en aboregina vilaĝo kaj poste verkis interesan kaj facile legeblan romanon «*Flugi kun la kakatuoj*». Pluraj esperantistoj venis de la departementoj Manche, Orne kaj Seine-Maritime. Cetere, en la marta bulteno vi legos longan raporton, kun fotoj, de Jean Colombel (Le Havre).

Nia normanda asocio grave helpis en tiu turneo per subvencio de 300 €.

Yves NICOLAS

Trevor STEELE dum kunveno de la asocia grupo en Hérouville.

Foto sendita de **Michèle LANGEAIS**





Kotizoj - Abonoj por 2012 :

Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris

Tel. : 09.51.77.18.33. www.esperanto-france.org

Cotisation : (chômeurs : 15 €) 39,00 €

Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : 18,00 €

• Universala Esperanto Asocio :

Cotisation : (avec Jarlibro) 25,00 €

Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) 10,00 €

Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : 61,00 €

• Esperanto-Jeunes :

Cotisation « Espéranto-Jeunes » + « Espéranto France » : 30,00 €

d° - pour étudiants, chômeurs : 15,00 €

• TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :

Cotisation + abonnement à « Kontakto » : 25,00 €

- d° - + abonnement à la revue « Esperanto » 61,00 €

Esperanto-INFO : Les Bories de Coperlac.

Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.

Tel. : 04.66.48.58.48

CCP. : n°11.901.46.B 029 Marseille.

Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20,00 €

Mi ne trovis Esperantistojn en Gronlando

Lastan aŭguston, post longa vojaĝo, aviadhalto en Kopenhago (2 tagoj, 3 aviadiloj kaj 1 helikoptero), superflugado de Islando kaj aviadirado de oriento al okcidento de tiu grandega lando (Gronlando estas vasta 7 foje pli ol Francio) ni alvenis al Uummannak.

Tiu vilaĝo estas ĝemelita kun Granville (50). Konstruita sur rokoj, domoj kolorŝirmiritaj per malsamaj koloroj por rompi la monotecon dum longa vintro kun la blankeco de la glacio.

La glacimontoj, kun malsamaj formoj pli belaj unu la aliaj, glitis malrapide antaŭ niaj fenestroj.

La « Inuit » (iam : Eskimoj) perdis siajn kulturajn trajtojn kaj « eniris » en modernismo, koloniitaj de Danoj. La junuloj aspiras studi en tiu lando kaj restadi tie.

La sledhundoj, pro degelo de la bankizo, estas uzitaj nur dum 2 monatoj anstataŭ 12, kaj stagnas sur rokoj, malaktivaj.

Bedaŭrinde la komunikada lingvo estas la Angla, ne Esperanto.

Kiu volas instrui Esperanton al « Inuit » ?

Christian LEVESQUE

AGRABLAJN FESTO-TAGOJN ! **al ĉiuj !**

SAT-AMIKARO : 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013 Paris. Tel. : 01.44.24.50.48.

www.sat-amikaro.org

CCP. : 37.852.90.L La Source.

Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35,00 €

Abonnement simple «La Sago» sans adhésion 32,00 €

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.71.90.

www.satesperanto.org

Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo »

(11 n°s) : 52,00 €

Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lt de Vaisseau Paris.

76120 Le Grand Quevilly.

CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

